"We sure had a great time, *tre grandega!* You see we have been planning this thing for a long time but something went wrong every blessed time, but finally we made our 'get-away,' even if we did have to leave our president, Sro. H. L. Brown, at home sick and other members absent on vacation or by sickness. We were the guests of Fno. Eavey, an enthusiastic member, recently of Terre Haute, but now living the simple life on a farm near Lewis. We couldn't say enough in praise of her hospitality, because we ate too much to talk well! *Multajn mangaĵojn!*

"Sro. Anderson had his camera along and 'took' us coming and going and eating; we unfurled our green and white flag, planted the banner of the local club and proceeded to hold an outdoor meeting. We had readings, interpretations, historical sketches, poems, songs, etc., in Esperanto and English; and say, you ought to have heard those original stories by Vice President Clark! His last story always so far outstripped the preceding that we verily feared he would become unable to tell the truth.

Miss Ercie Oplinger won the prize playing *Cio*. That is an Esperanto game that will tax your memory to the limit; sure, come around and we'll show you the how of it.


"We fished some, fought mosquitoes, held our campfire chat, ate lunch again, finished up with a hayride and returned tired, but happy.

"Except for pleasure parties and foreign correspondence the club will take a rest on Esperanto for the remainder of the summer, but when it grows cooler we shall choose new officers and habnob with our numerous *fremdaj geamikoj*."

The visitors from Lewis were: Misses Lulu and Maud Moon, Miss Della Harris, Miss Orpha McLaughlin, Dr. and Mrs. Forsythe, Clayborne Eavey. From Terre Haute: Miss Nora Arnold, Miss Ercie Oplinger and Miss Myrtle Cretcher and T. J. Walker.

El *Ayer's Beacon* esperantigis Sino. Alice M. Boies, Sedalia, Missouri

Estis sub la persona direktado de Washington kaj komitato de Kongreso tiam en kunsidado ĉe Philadelphia ke la unua standardo de la Unuigitaj Statoj estis farita, en 1777. Ili vizitis la butiketon de Sinjorino Betsey Ross, en Arch Strato, kaj demandis ĉu ŝi povas fabriki standardon laŭ modelo prezentita. Ŝi



konsentis fari tion, sed sugestis, ke kvinpinta stelo estus pli belforma ol la sespinta stelo, kiun ili proponis. Por ilustrian ideon, ŝi faldis paperfolion kaj per unu tranĉo de la tondilo faris modelon de kvinpinta stelo, kiu tuj estis aprobita. Ŝi faris la standardon kaj oni levis ĝin la sekvantan tagon.

La apudaj diagramoj montras, kiel Sino. Ross faldis la paperfolion por fari

kvinpintan stelon per unu tranĉo de la tondilo.

Unue, prenu pecon da papero 5x6 colojn, aŭ havanta proksimume tiun proporcion. Faldu ĝin unufoje meze de la longo. Tiam, tenante ĝin kun la faldo malsupre, turnu la subdekstran angulon supren kiĉel en Diagramo 1. Diagramo 2 montras la maldekstran angulon turnita supre. No. 3—turnu la maldekstran flankon ĝuste ĝis la dekstra. No. 4—turnu la du pintojn for de vi kaj tranĉu laŭ la punktita linio.

#### NEW PROPAGANDA MATERIAL.

While the interest of the Esperanto World is now centered in Barcelona, this does not mean that the work of propaganda is forgotten. On the contrary, we are constantly receiving samples and advance proofs of new propaganda material which, coming as it does from all parts of the world, shows that the Esperantists are very much alive and rapidly progressing.

One of the best, if not the very best propaganda display is to exhibit numbers of the various publications one receives. There lies some unexplainable fascination in publications coming from all parts of the world and the only regret one feels is that he is unable to have more. This deficiency has been remedied to a certain extent by the Esperanta Gruparo Berlino. They have just put out a very satisfactory photograph of over one hundred Esperanto publications arranged in a very artistic manner, which we reproduce on a small scale in a full page cut. These photographs may be obtained from this office at ten cents each and will be found invaluable to add to the display of literature on hand.



# POR LA KOMENCANTO

## THE GENERAL MEANING OF PREPOSITIONS.

One of the most interesting as well as one of the most important matters in the syntax of Esperanto is the correct use of the prepositions. The meanings and uses of prepositions are not exactly alike in any two languages. Consequently it is not always correct to translate a preposition in one language by what is equivalent in another tongue to some one or two of its meanings. Care must be taken to see that the fundamental sense of the two words is the same.

Although the preposition *je* exists in order to allow latitude whenever there is doubt about the exact preposition desired, there will be no need of frequent use of *je* if the inherent force of the other prepositions is carefully noted.

The preposition *de* conveys an idea of *separation* from a source or starting point. The literal meaning is well shown in the following examples, in which it will be noted that the Esperanto is really more logical than English:

*Li estas malproksime de mi*, He is far from me.

*Li estas proksime de mi*, He is near me (is near, measuring from me as a starting point).

Figurative uses developing from this original sense are shown in the following:

*Li petis helpon de li*, He sought help from him.

*La rezulto dependas de vi*, The result depends on (results from) you.

*Mi estas ĉi tie de la unua de marto*, I have been here from the first of March.

The uses of *de* to express agency, (the source of an action), and possession (the source of emanation of ownership) develop naturally and easily from the fundamental meaning.

The preposition *al* conveys the idea of motion to or toward something, whether figurative or literal. The motion is thought of as starting from the logical subject of the sentence, whether

or not this happens to be also the grammatical subject. Some examples of this figurative character are:

*La timo al la morto*, The fear of (toward) death.

*Ĝi estas kaŝata al ni*, It is hidden from (to) us.

*Benojn al vi*, Blessings on (toward) you.

This force of the preposition, somewhat weakened, develops into the familiar usage similar to the "dative of reference" in Latin, as in the following:

*Mi preparis al vi manĝaĵon*, I prepared food for you.

*Mi forprenis la libron al li*, I took the book away from him.

The inherent meaning of the various other Esperanto prepositions may be similarly examined, and it will be found that apparently differing uses are really to be placed in the same classification. The seeming variation is due to the different meaning of their English equivalents.

It is not alone the Esperanto prepositions whose meaning should be clearly distinguished. The English prepositions likewise have figurative and literal meanings, of a far more complicated character, and many peculiarities in regard to words which are entirely synonymous, or partially so. For example, corresponding to one Esperanto preposition, *pri*, English uses the following: (1) *about*, whose literal sense corresponds to *ĉirkaŭ*, (2) *over*, whose literal sense corresponds to *super*, (3) *on*, *upon*, whose literal sense corresponds to *sur*, (4) *of*, whose literal sense corresponds to *de*, (5) *anent*, which may be compared roughly to *kontraŭ*. The correct usage of each of these English prepositions in its figurative sense was established by the usage of the literal meaning, even though this may now partially be forgotten. But to translate their figurative use by means of the Esperanto equivalent for their literal sense is a mistake of which the beginner is often guilty, and which he should take especial pains to avoid. IVY KELLERMAN.



# EN ESPERANTA RITMO

## INFANECO DE HIAVATO.

El Angla de *Longfellow* tradukis  
Charles E. Baker.

Teren tra krepusko de vespero,  
En mondaĝo longe forgesita,  
En epoko jam ne memorata,  
En la plena lun' Nokomo falis,  
Bela lunanino kiu estas  
Jam edzino tamen ne patrino.

Si kun siaj kunulinoj ludis  
Sin svingante de la luna rando  
Per svingilo vinberejera, kiam  
Rifuzita amkonkurantino,  
Plena de ĵaluzo kaj malamo,  
Ekdistranĉis la svingilon verdan,  
Tranĉis la torditajn vinberejerojn,  
Kaj Nokomo falis timigita,  
Teren tra krepusko de vespero,  
Sur herbejon plenan de floraro.  
"Jen steleto!" kriis la popolo,  
"Teren falas stelo el ĉielo!"

Tie inter muskoj kaj filikoj,  
Inter la lilioj de l' herbejo,  
En la brilo de la lun' kaj steloj,  
Al Noko' naskiĝis filineto  
Kiun nomis la patrin' Venono.  
La filino de Nokomo kreskis  
Kiel la lilioj de l' herbejo,  
Alta kaj gracia junulino,  
Kun la belo de la luna lumo,  
Kun la belo de la astra brilo.

Kaj Nokom' avertis la filinon.  
Ofte ripetonte la averton:  
"Ho neniam fidu Mudjekivon!  
Fidu ne la Okcidentan Venton!  
Ne aŭskultu lian paroleton;  
Ne kuŝiĝu sur la gramenejon,  
Ne kliniĝu inter la lilioj,  
Por ke ne la Okcidenta Vento,  
Alveninte kaŝe, vin difektu!"

Sed Venono tute malobeis  
La sagacan diron de Nokomo;  
Kaj vespere tra l' herbejo venis  
L' Okcidenta Vento parolanta  
Dolĉe al la floroj kaj folioj,  
Fleksetanta florojn kaj gramenojn;  
Kaj li trovis inter la lilioj  
Belan la filinon de Nokomo,  
Do karese kaj per dolĉaj vortoj  
Li amindumadis ŝin ĝis kiam  
Ŝi spiritdolare naskis filon,  
Filon de malĝojo kaj de amo:

Do naskiĝis mia Hiavato,  
Do naskiĝis la infan' mirinda;  
Sed Venono, dolĉa la patrino,  
Malĝojege mortis, forlasite  
De l' kruela Vento Okcidenta,  
De la malfidinda Mudjekivo.

Pro la mortintino longe, laŭte  
Ploris la avin' de Hiavato:  
"Ho, ke mi malvivus!" ŝi murmuris,  
"Ke hodiaŭ mi kun vi malvivus,  
Ne premote plu de laborego,  
Nek ploradigate de malĝojo."

Sur la bordo de Superioro  
Staris la tipio de Nokomo,  
La filino de la Lun', Nokomo.  
Malantaŭe staris la arbaro,  
Staris la mallumaj pinarbejoj,  
Staris la piceoj kun konusoj;  
Kaj antaŭe ondis la lagego,  
Rulis ĝia travidebla akvo,  
Batis ĝia akvo sunlumata.

Tie la avin' maljuna zorgis  
Pri la infaneto Hiavato,  
Luladante lin en lulileto  
El selaĵo de tilia trunko,  
Enligitan dense per ŝnuretoj  
El la felo de la karibuo,  
Sur litet' el muskoj kaj el junkoj;

Ĉesigante la esploron lian  
 Per la miaceto, "Silentigu!  
 Aŭdos vin la granda Nuda Urso!"  
 Dormigante lin per lulkanteto:  
 "Eŭa-je! Ho mia gufideto!  
 Kiu lumas nokte la tipion  
 Per la brilo de la okulegoj?  
 Eŭa-je! Ho mia gufideto!"

Multe la avino lin instruis  
 Pri la brilaj astroj en ĉielo;  
 Elmontrante la kometon kiu  
 Havas la flamanton fajrhararon;  
 Kaj la mortodancon de fantomoj—  
 Militistoj kunportantaj plumojn  
 Kaj batilojn, malproksime norde  
 En malvarmaj noktoj de la vintro;  
 Elmontrante la vojegon blankon  
 Por la fantomaro kaj ombraĵoj,

Kaj vidante la ĉielon arkon  
 En la oriento li demandis,  
 "Kio estas jen, avino mia?"  
 Kaj respondis la avino bona:  
 "Estas la ĉielo de la floroj;  
 La sovaĝaj floroj de l' arbejo,  
 La lilioj de la gramenejo,  
 Pereinte kaj velkinte tere,  
 Supre en ĉielo jen refloras."

Meze de la nokto vekiginte  
 Per la pepegado de gufaro,  
 Le tremante pro infanteruro  
 Ekdemandis, "Kio estas tio?"  
 Kaj respondis la avino bona:  
 "Fi! infano mia, tio estas  
 Nur la gufo kaj la gufidaro,  
 Kiuj konversadas proprolingve,  
 Riproĉante ĉiu la aliajn."

Tial la knabeto Hiavato  
 Lernis la parolan de la birdoj,  
 La sekretojn kaj la nomojn,  
 Ĉi el kia ŝtofo  
 konstruas,  
 la ovoj,  
 birdidoj,  
 ras,

Kaj aliafine portas plumon.  
Tiam li ordonis Hiavaton:  
"Iru la arbaron, mia filo,  
Kie kune paŝtas ruĝaj cervoj,  
Kaj mortigu cervon antlerozan."

Tuje tre fiere en arbaron,  
Kunportante arkon kaj sagaron,  
Tute sole marŝis Hiavato.  
Kaj ĉirkaŭe kantis la birdetoj,  
"Nin ne pafu, bona Hiavato!"  
Kantis la sialo kaj la turdo,  
"Min ne pafu, bona Hiavato!"  
Supren sur la kverko tre proksima  
Saltis la agema aĝidumo,  
Kuris kaj saltetis tra la branĉoj,  
Tusis kaj babilis el la kverko,  
Ridis, ekdirante interride,  
"Min ne pafu, bona Hiavato!"

Kaj timema la leporo saltis  
Flanken el la vojo de la knabo,  
Kaj sidante rekte sur la koksoj,  
Pro timemo parte pro ludemo,  
Diris gaje al la ĉasisteto,  
"Min ne pafu, bona Hiavato!"

Sed li ilin tute ne rimarkis,  
Tute li ignoris la bestetojn,  
Ĉar li pensis sole pri la cervoj;  
Kaj laŭ hufsignaro kondukanta  
Lin malsupren al rivera bordo,  
Al la transvadejo de la bestoj,  
Kvazaŭ dormetante li promenis.

Sin kaŝinte inter la alvidoj  
Tie li atendis la cervaron;  
Fine li ekvidis du okulojn  
El la orbitaĵo rigardantajn,  
Du naztruojn montri al la vento,  
Kaj cervego venis laŭ la vojo,  
Ombrizata de la foliaĵo,  
Sunlumata inter la ombraĵoj.  
Kaj la karo de la knabo tremis  
Kiel supre la betulfolioj  
Dum la cervo venis laŭ la vojo.

Tiam sur genuon sin levante,  
Al la besto li celigis sagon;  
Kaj apenaŭ branĉo aŭ folio  
Movis ĉe la movo de la knabo,

Sed la vigla cervo eksaltetis,  
Haltis kaj aŭskultis dum momento,  
Do terure saltis li antaŭen  
Kvazaŭ por renkonti la saĝeton;  
Ha! la zuma, la fatala sago,  
Kiel vesp' kolera kaj zumanta,  
Rekte alfluginte ĝi lin pikis!

Falis teren la senviva cervo  
En arbaro apud la rivero;  
Jam ne batas lia tima boro,  
Sed la brava koro de la knabo  
Batas kaj kriadas pro ĝojego  
Dum li portas hejmen sian cervon.  
Kaj lago kaj Nokom' aplaŭdis  
La revenon de la ĉasisteto.

El la cervofelo la avino  
Faris novan vest' por Hiavato;  
Kaj el la viando de la cervo  
Ŝi festenon faris al la gento,  
Por honori la ĉasiston junan.  
Tuta la vilaĝo gaje venis  
Por rigali kun la ĝoja trio;  
La gastaro laŭdis Hiavaton,  
Lin nomante la Potenca Koro,  
Lin nomante Koro de Kolimbo.

CHARLES E. BAKER.

Karibuo: latine, *rangifer caribow*; angle, *caribow*, *American reindeer*.

Nuda Urso: mita besto preparolata de la indianoj.

Sialo: latine, *sialia*; angle, *bluebird*.

Ruĝa cervo: latine, *cervus canadensis*; angle, *red deer*, *wapiti*, *American stag*. Tiu ĉi estas la besto kiun en Usono oni orinare misnomas "elk;" sed la sola Amerika besto, al kiu la noma "elk" (alko) prave apartenas, estas la "moose," (latine, *alces Americanus*).

Aĝidumo: latine, *sciurus Hudsonius*; indiane, *aĝidumo*; angle, *redsquirit*, *chickaree*.

Foje riĉulino vizitis nigrulinon por vidi ŝian nove naskitan infaneton, ĉar, kiel oni scias, tiuj infanetoj estas ordinare tre ĉarmaj. Dum la vizitantino admiradis la ideton, ŝi rimarkis, ke la amema patrino ofte parolis al ĝi sub la nomo de "Ekza." "Ekza," demandis la riĉulino, "kiu estas do la plena nomo de la infaneto?" "Nu," diris la patrino, "kiam necesiĝis nomigi la karuleton, pro manko de biblio en la domo, estis necese uzi la almanakon kaj ni nomigis ŝin 'Ekzemo.'" (La usona almanako enhavas multe da patentmedicinaj reklamoj.)

# LITERATURO

## LA ORARBO.

El la germana tradukis Herbert M. Scott

La apartamento en kiu nia historio komenciĝas aspektis tre simpla kaj nuda. Apud la blankigitaj muroj, kies sola ornamo konsistis el paro da flavigintaj landkartoj, staris du mallarĝaj litoj, librujo kaj vestoŝranko, sur kiu lasta sin trovis terĝlobo. La mezon de l'ĉambro okupis longa tablo ornamita per multaj inkmakuloj, kaj al la tablo sidis sur malmolaj benketoj du knaboj de ĉirkau dekdu jaroj.

La blonda cerbumis super malfacila legaĵo el Kornelio Nepos kaj uzadis ĝemante la pezan vortaron; la ĥrua kontraŭe klopodis el naŭnumera nombro eltiri la kubradikon. La filologo nomiĝis Hans, la matematikisto Hajns.

Iafoje la knaboj levis la kapojn de la studoj kaj rigardis sopire al la malfermita fenestro, tra kiu la muŝoj zumante en- kaj elflugis. En la ĝardeno kuŝis ora sunbrilo sur arboj kaj plektobariloj, kaj kvazaŭ mokante rigardis floranta sambuka branĉo en la studoĉambron de l'ambaŭ esperantaj. Ankoraŭ unu horon devas la mizeruloj sidi kaj ŝviti, kaj la minutoj preterrampadis kiel la limakoj sur la grosuoj eksterne en la ĝardeno. En la apuda ĉambro sidis ĉe l'skribotablo Doktoro Batulo, al kiu la knaboj estis konfiditaj por disciplino kaj instruo, kaj la kuniga pordo staris malferma, tiel ke la Doktoro povis sin iam ajn certigi pri ilia ĉeesto kaj kontroli ilian faradon.

"Hanibalo povus pli sprite fari ol veturi super la Alpoj," subdiris Hans, kaj "naŭoble okdek unu faras septcent dudek naŭ," murmuris Hajns per surda voĉo. Tiam ili ambaŭ suprenrigardis de sia laboro, sin okulumis reciproke kaj oscedis.

Subite ili ekaŭdis laŭtan zumadon.

Orskarabo estis vaginta en la ĉambron. Trifoje ĝi flugis rondire ĉirkaŭ la kapoj de l'knaboj, kaj poste—ŝpruc—ĝi kuŝis en la inkujo.

"Vere estis al li tre juste," diris Hajns, "Kial li ne restis kie li bonfartis! Tamen en inko droni, tio estas ja tro mizera morto. Atendu, amiko, mi vin savos."

Li volis la baraktantan cimon per la plumingo helpi el la inko, sed pli rapide elfaris Hans la savon per la fingro. Kaj tiam la knaboj elsekigis la malfeliĉulon per la sorbilo kaj alrigardis dum li sin purigis per la antaŭpiedo.

"Li havas ruĝan spegulon sur la brustokesto kaj nigrajn kornojn," diris Hans, "Ĝi estas la orskabela reĝo. Li loĝas en kastelo kiu estas konstruita el jasmenfloroj kaj tegita per rozfolioj. Griloj estas liaj muzikantoj kaj lampiroj liaj torĉportistoj."

"Ho, sensencaĵo!" parolis Hajns.

"Kaj kiu la orskabelan reĝon trafas," daŭrigis Hans, "tiu estas feliĉulo. Al vi notu, Hajns, por ni io atendas, aventuro aŭ io alia eksterordinara, kaj hodiaŭ estas, ankoraŭ al tio, la unua de Majo, kiam okazas pli ol unu mirindaĵo. Vidu, kiel li signas al ni per la antenoj kaj levas la flugilojn. Nun li sin tuj aliformigos kaj antaŭ nin staros kiel elfo, per reĝa mantelo vestita kaj kun ora kasko sur la kapo."

"Forflugos li," diris Hajns kaj ridis, "zum—jen vi havas."

La knaboj paŝis al la fenestro kaj postrigardis la skarabon. En larĝa kurbo la ekbrilanta juvelo tratanĉis la aeron kaj malaperis preter la ĝardenmuro. Nun aŭdigis el la apudĉambro kraĉtuso, kaj la ambaŭ lernantoj reiris rapide siajn librojn.

"Jen havas ni la mirindaĵon," murmuretis Hans al sia kunulo kaj montris la inkujon.

El la inkujo elŝovis sin verda arbedo,

kiu kreskis videble kaj leviĝis al la plafono.

“Ni sonĝas,” diris Hajns kaj frotis al si la okulojn.

“Ne, tio estas fabelo,” jubileis Hans, “viva fabelo, kaj ni partoprenas.”

Kaj la arbido fariĝas pli fortika kaj elmetis branĉojn kaj branĉetojn kun folioj kaj burĝonoj. La plafono de l'ĉambro malaperis, la muroj neniigis, kaj krepuska arbaraŭlo ĉirkaŭis la mirigitajn knabojn.

“Antaŭen!” kriis Hans kaj tiradis kun si la malinklinan Hajns'on. “Nun venas la aventuro.”

La floranta arbetaro disiĝis mem kaj malfermis al la knaboj irejon. Rompite briletis la sunlumo tra la latisego de la arbaro kaj pentris mil orajn okulojn sur la musko, kaj el la musko leviĝis stelfloroj de brulaj koloroj, kaj verda konfuzata plektokreskaĵo sin vindis ĉirkaŭ la muskkovritaj trunkoj. Supre inter la branĉetoj flirtis kantantaj birdoj en brila plumaro, kaj cervoj kaj cervinoj saltis ĝoje tra la arbaĵo.

Nun lumiĝis la arbaro, inter la trunkoj briletis kiel fajra brilo, kaj Hans murmuretis al la kunulo, “Jen venas.”

Ili eniris maldensejon, en kies mezo staris arbo sola. Sed tio ne estis ordinara arbo; tio estis la mirarbo, pri kiu Hans tiom ofte aŭdis, la arbo kun la oraj folioj. La knaboj nemovis pro mirō.

Jen paŝis el malantaŭ la trunko pigmeo, ne pli granda ol trijara infano, sed ne dikkapa kaj platpieda, kiel la pigmeoj kutime estas, sed maldika kaj delikate kreskinta. Li portis verdan mantelon kaj orkaskon, kaj la ambaŭ knaboj sciis kiu staras antaŭ ili.

La pigmeo antaŭen faris du paŝojn kaj riverencis. “La ensorĉita princino atendas sian savonton,” li diris. “Kiu el vi ambaŭ la riskaĵon entreprenos?”

“Mi,” diris Hans per ĝoja voĉo. Kaj tuj la pigmeo alkondukis ĉevaleton kiu estis laktoblanka kaj maĉis je ora brido.

“Ne faru, Hans!” avertis Hajns maltrankvile, sed Hans sidis jam sur la selo. Blekante sin levis la sorĉĉevalo aeren, tiam ĝi reĵetis la kapon kaj kuris kun flugantaj kolharoj en la arbaron. Lu-

manta orskabelo flugis kiel kondukanto antaŭe. Ankoraŭ unufoje returnis Hans la kapon kaj vidis sian kamaradon kiu staras sub la orarbo; poste li perdis arbon kaj amikon el vido.

Tio estis ĝoja rajdo. Hans sidis tiel certe kaj firme sur la selo kvazau anstataŭ ĉevalo li havus sub si la kutiman lernejbendon. Kiam li pripensis ke nur antaŭ horo li ĝemis ĉe Kornelio Nepos kaj tremis antaŭ Doktoro Batulo, li devis ridi. La lernejknabeto en la mallonga ĵaketo estis majesta rajdisto iĝinta kun korpvesto kaj mantelo, glavo kaj orspronoj. Do aflugis li tra la sorĉarbaro.

Nun faris lia ĉevaleto ĝojan blekon. La arbaro iĝis luma. Ankoraŭ duon da salto, kaj ĉevalo kaj rajdanto haltis antaŭ brila kastelo. Gajaj flagoj flirtis el la turoj, kornoj kaj trumpetoj sonoritis, kaj sur la balkono staris la princino kaj flirtigis blankan tukon. Ŝi aspektis preskaŭ kiel najbaro Helenjo, kun kiu Rajdisto Hans ludis kiam li ankoraŭ estis knabo kaj iris lerni, nur ŝi estis pli granda kaj miloble pli bela.

Hans saltis de la selo kaj surrapidis kun tintantaj spronoj la marmorŝtuparon. En la malfermita kastelpordo staris viro, verŝajne la kortegestro de l'princino, kiu aperis al nia Hans tre konata.

Kaj la kortegestro eliris la manon, kaptis Rajdiston Hans je la orelo kaj kriis, “Endormiĝis la fripono. Atendu, vi ricevos!”

Tiel la sorĉo havis finon. Hans sidis denove al la inkmakulita tablo, antaŭ li kuŝis la Kornelio Nepos kaj la latina vortaro, kontraŭ li sidis Hajns, kaj apud li staris Doktoro Batulo kaj rigardis riproĉe per siaj okulvitroj la sonĝinton.

Kiam fine la horo de libereco batis kaj la ambaŭ knaboj ekstere en la ĝardeno sub la sambuko manĝis vespere, dividis Hans kun sia amiko tion kion li sonĝis.

“Tio estas mirinde,” diris Hajns, kiam Hans finis, “mirindege. La saman sonĝon mi ankaŭ havis. Nur la finiĝo estas alia; sorĉkastelo ne aperas en sonĝo mia.”

“Rakontu!” urĝis Hans.

“Ĝis la orarbo mia sonĝo konsentas sufiĉe kun la cia. Ci suriris sur la blankan ĉevalon kaj forrajdis, por savi la princinon. Mi kontraŭe forrestis, skuis la arbon kaj plenigis al mi ĉiujn poŝojn je oraj folioj. Poste min vekis la Doktoro, kaj tie finiĝis por mi la gloro.”

“Hajns,” diris Hans serioze, kaj kaptis la amikon je la mano. “Se du unu saman sonĝon havas, ĝi do certe efektiviĝos. La sonĝo estis profeta. Notu ci la parolon.”

Tiam la knaboj finis la reston de l'vespermanĝo kaj sin turnis al la pilkludado.

Efektiviĝis la sonĝoj de l'knaboj? Jes. Hans iĝis poeto kaj lasis sian ĉevaleton troti tra la verdaj mirarbaroj. Hajns kontraŭe, kiu sonĝante skuis la orarbon, iĝis lia eldonisto.

#### LA HEROA GASTEJESTRO.

La aŭstria provinco “Tirolo” festos baldaŭ la centjaran datrevenon pri la heroo militiro kondukita de Andreas Hofer en la jaro 1809a por liberigi tiun landon el la fremda potenco. La aŭstria imperiestro Francisko-Josefo promesis iri Insbruckon la ĉefurbo, de tiu pen-  
trginda lando, por ĉeesti ĉe la datrevenaj festoj kiuj okazos tie.

En tiuj festoj, kredeble, “verdo” estos la nura koloro! Kial? Efektive la vojaĝanto kiu vizitas la tirolajn valojn estas mirigita, vidante kiel la popolanaro anas pasie la verdan koloron. En Napolo la “ruĝo” estas tre ŝatata, sed tie ĉi oni ĉie vidas “verdon.” Ĉiutage oni rimarkas en la Insbruckajn Stratojn, nur verdajn ĉapelojn, verdajn vestojn k. t. p. Certe se iam niaj esperantistaj flagoj flirtus tie ili konus triumfe tiun verdan simfonion. Tiu stranga ŝatego por la verdaĵoj estas kaŭzita, mi opinias pro la belegaj paŝtejoj kaj la multaj abiaroj kiuj ĉirkaŭas tiun lokon.

La heroo de nia historio, Andreas Hofer estas en “Tirolo” la famaĵo la plej sindona al la imperio kaj la plej ligita al ĝia estinteco. La alia estas nur ŝtonega muro, nomita “Martinswald” alta je 500 metroj, staranta ĉe la Svisa

vojo. Tiu ŝtonego gloriĝis, ĉar antaŭ kvar jarcentoj, germana imperiestro “Marksimilicno” ĉasante la ĉamon tie, preskaŭ senviviĝis, devojiĝante ne retrovinte la malsupreniran vojeton.

Andreas Hofer, honoris la gastejestraro kiu estas tiel multnombra en Tirolo kiel en Svisujo, kaj precipe pligrandiĝis lastjare. Efektive Andreas Hofer estis gastejestro. Lia gastejo troviĝis en Sankta Leonardo, loketo ofte vizitata de la vojaĝantoj kiuj pasas la vintron en Merano apud la itala landlimo. Ordinare la gastejestra profesio tute ne pretiĝis, por la lerteco kaj la multimeco necesaj por la milito. Tamen Hofer, plenumis la malfacilan taskon pro kiu, la generaloj de la Wiena kortego, ŝajnis maltaŭgaj. Tiu okaza kapitano farante embuskan militon, gajnis decidajn venkojn dum la profesiaj strategioj, de la aŭstria generalaro, kontraŭmetitaj al la franca armeo, malvenkis. Ĝis la jaro 1805a li vivis trankvile en sia gastejo, sed post tiu momento, li ekmilitis kun kelkej bandoj da anoj kontraŭ la franca marŝalo Nej. Malgraŭ sia kuraĝo li ne sukcesis, kaj fine la “Tirolo” estis posedata de Bavarujo kiu estis fariĝinta amikon de Francujo.

Depost jaro 1805a ĝis 1809a tiu viro negociis kun aŭstria regantaro. Li imponis la imperiestron kaj la ministraron. Subite, aprile 1809a posedante armilojn kaj monon, li proklamis la ribelon. Tio estis longa kaj terura batalo en la tirolaj montoj, kie multaj aventuroj okazis en la eternaj neĝoj.

Unue li devigis kapitulaci la bandojn francajn kaj bavarajn en Insbrucko. Sed la aŭstria generalo Chasteler perdis la urbon. Denove Hofer rekaptis Insbruckon.

Tiam alvenis la franca marŝalo Lefebore kuraĝema kaj nevenkebla militisto. Kvankam Hofer ne plu estis helpita de aŭstrujo, li tamen atakis Lefebore en la valo “Stelvio,” ruligis, faligis arbojn kaj ŝtonegojn, sur la soldatarojn. Lefebore, foriris, sed la venkoj gajnitaj, de la franca armeo sub la imperiestro Napoleon en la Danubajn bordojn devigis aŭstrujon recedi la “Tironon.”

Andreas Hofer, nevenkebla ne volis cedi, li ribeliĝis lastfoje. Malfeliĉe, ia pastro kiu estis lia amiko, perfide liveris lin al la generalo Baraguay d' Hilliers. Li estis kondukita ĝis Mantoue kie li mirigis la francan militjuĝistaron pro lia braveco nevenkebla. Respektante tian kuraĝon, la juĝantaj oficiroj ne volis kondamni lin esti mortigonta sed imperia sciigilo elveninta el Parizo, ordonis la neeviteblan ekzekuton, kaj fine, Hofer falis mortpafita, kondamnita la pafadon. Tiel mortis tiu tirola heroo, respektita de ĉiuj. Eĉ la generalo Baraguay d' Hillier, honoris lin en siaj memorskribaĵoj, kiel antikva militisto.

La statuo de Hofer estas ĉie en Tirolo. La unua estas konstruita en la jaro 1834a en Insbrucko, ĉe la franciskana preĝejo, kie de tempo al tempo la popoloj venas viziti lin kun arda pieco.

Certe, liaj baldaŭaj festoj estas festoj taj de entuziasma amaso.

Maurice Constantine, Lille, France.

### PRI LITPREDIKOJ.

En la trinkejo "Ora Barelo," ĉe la ronda gastotablo (ne Esperantista!) Sro. Gluviro pasigas la plej agrablajn horojn de sia vivo. Ĉar la tiea biero estas bonega, la amikoj sinceraj kaj babilemaj, la rondo gaja. Nur pri la trinkeja horloĝo, Sro. Gluviro ne estas kontenta: ĝi ja ĉiam ŝajnas trorapidi, kaj ofte enuaj litpredikoj atendas nokte revenantajn edziĝintajn gastotablanojn.

Iuvespere, en la lasta vintro, Gluviro revenis en sian straton, je la dua matene! Frostis, neĝis eĉ por bierplenigita korpo la vetero estis malagrabra. Gluviro haltis antaŭ la numero 48, kaj, ne trovinte ian ŝlosilon en sia poŝo, li sonorigis. . .

Tondro kaj fulmo! oni ne sajnjis rapidi por malfermi la pordon. Ankoraŭ li sonorigis, tre kolere nun, malgraŭ sia timo pro sia edzino, filino de la fama kolonelo Muelilo.

Ankoraŭ longa atendo. . . Fine, bruo aŭdiĝis en la koridoro, oni forŝovis la riglilon, kaj aperis antaŭ la ebrulo malgranda, ĉemivestita, frostremanta mal-

junulo kiu ĝentile diris al Gluviro: "Senkulpigu, Sro., via hejmo ne estas tiu ĉi, vi eraris, vi ja loĝas en la numero 84."

"Kion tio signifas?" ekkriis Gluviro, "vi unue lasas min atendi en la frosto kaj neĝo dum duonhoro, kaj fine mi eĉ ne loĝas tie ĉi! Malĝentilulo!"

*Pentrindaĵo!*

En tiu sama nokto, laŭtega edzina litprediko tremigis la murojn de la numero 84.

La sekvantan sabatnokton, la sonorilego de la proksima preĝejo jam sendis tri gravajn frapojn tra la malvarman aeron, kiam Sro. Gluviro revenis hejmen. Tamen li ne estis tiom ebria kiam la antaŭan fojon, kaj nun havis sian ŝlosilon, per kiu li senbrue malfermis la pordon de sia propra hejmo.

Li baldaŭ alvenis en sia dormoĉambro, kie lia edzino—ho feliĉo!—muzike ronkegis. Ĉiam senbrue li senvestigis sin en la nokta mallumeco. Tiam, timegante la vekigo de l'edzino kaj ŝian teruran litpredikon, li pripensis, pripensis . . . kaj elpensis ruzon.

Nur ĉemizvestite, li sidiĝis apud la lulilo de la infano, kaj komencis luli, unue tre dolĉe, iom post iom pli forte, fine, tiom bruege ke lia edzino vekigis.

"Celesto! Celesto! kion vi faras tie?"

"Kara Pelajino, la infaneto ekploris, mi saltis tuj el la lito, mi lulas, vi vidas . . . nun, feliĉe, ĝi ree jam dormas. . ."

"Do, certe, falsulo, ĝi dormas, jam de hieraŭ ĝi dormas tie ĉi en mia brako! Ha! ha! drinkulo, vi volis trompi min! k. t. p. (*Litprediko*).

\* \* \*

Nu, antaŭhieraŭ, ree nokte revenante, dum obstina pluvo, Sro. Gluviro ĵus antaŭe priskribitan okazintaĵon al siaj du fidelaj amikoj, Sroj. Plakalerko kaj Zabergeremo, kiam la unua el tiuj du gastotablanoj (ne Esperantistaj!) ekkriis:

"Ni konas bonan rimedon por senkolerigi litpredikeman edzinon."

"Kio estas?" demandis la du aliaj.

"Fari ĉion kion la edzino ordonas."

"Ni faru tion, jam tiun ĉi nokton," proponis Gluviro.

"Bone," deklaris Plakalerko, kondiĉe

ke tiu kiu ne agos tiamaniere pagu vespermanĝon por ni triope.”

“Akceptate!” ekkriis la trio, kaj kun tiu mistera intenco ĉiu drinkulo direktis sin al sia hejmo.

Kiam Sro. Plakalerko eniris la dormoĉambron, li trovas sian edzinon, legante ĵurnalon en la lito. Ŝi tuj komencis la kutiman predikon: “Ha! fine jen vi estas! Estas ree la dua horo! Kaj kion mi vidas? vi alportas vian malsekan pluvŝirmilon tien ĉi por malpurigi ĉion. Metu do ĝin en la liton mem, ebriulo!”

“Bona ideo!” diris Plakalerko, levis la littukojn kaj ĵetis la malsekan pluvombrelon sur la liton.

Enirante sian ĉambron, Sro. Zabergemo senvole puŝis kontraŭ grandan ŝrankon. “Kial vi ne renversas ĝin?” ekkriis lia subite vekita edzino.

“Vi pravas,” diris Zabergemo kaj, kun granda bruo, renversis la meblon.

Ce sia alveno en la dormoĉambro, Sro. Gluviro, kiu vere estis la plej ebria el la trio, metis piedon sub dikan tapiŝon kaj multpeze falis teren. Lia plej bona duono, la severa kolonelfilino, vekita de la bruo, tuj komencis mokan litpredikon:

“Ha! bonege! tian falon vi meritais! Ho, vi drinkegulo! mi dezirus ke vi disrompu vian kolon tiamaniere!”

Sed Gluviro, rapide sin levante, protestis ridante: “Ho! tute ne! mi ne faros tion, mia kara Pelajino, mi pliaŝatas pagi vespermanĝon!” SKALDO.

### LA PRINCO.

Laŭ Cezar Porto esperantigis por *Portugala Revuo* A. Gomes Perfira

Iam ekzistis grava princo, posedanto de grandaj landoj kaj estro de multaj vasaloj.

Tiu princo vidis, sonĝe, la plej ĉarman virgulinon, kiun la imago povas pentri, kaj restis tiagrade ravita ke, forlasante definitive la aferojn pri sia lando, li nur pensis serĉi la realaĵon de tiu sonĝo. Promesinte riĉegajn premiojn al kiu ajn montrus al li lian fiktivaĵon vivanta; senkapiginte mil personojn kaj enkarceriginte egalombro da vasaloj, kiuj estis ĉompintaj liajn esperojn, vidante ke li,

princo, ne trafis siajn celojn, demetis flanken la kronon kaj sceptron, kaj iris migrante tra la mondo per serĉi la anĝelan belulinon. Li provis ĉion, aventuris ĉion, kio estas ebla home; li demandis ĉiujn sendistinge. Fine, jam senespera, kun la koro malplena je espero, oni konsilis lin ke li pridemandu maljunulon, kiun oni nomis Ermito,—sanktulon (kiel oni diras) kiu havas konsolon por ĉio.

—Tiu, kiun vi serĉas, oni ne trovas en tiu ĉi mondo, nur oni povas trovi en la ĉielo.

—Kaj kiel oni iras en la ĉielon?

—Por obteni la ĉielon, mia filo, estas necese suferigi la korpon, manĝi malmulte kaj dormi malbone, praktiki bonajn agojn kaj, precipe, turmentigi per skurĝbatoj.

La princo tuj akceptis ĉi tiujn rimedojn kaj lia animo tiom deziregis la ĉielon ke antaŭ unu jaro, li mortigis.

Jen li alvenas al la pordo de la paradizo. Voĉo iom elnaza demandis de la interno, kiu frapis. La princo rakontis fidele sian tragedian historion. Tiam, patre, Sankto Petro, kiu estis la kunparolanto:

—Mia amiko, tiu, kiun vi serĉas, estas precize la Feliĉo, tia la virgulino, kian vi songis; tamen ŝi ne loĝas tie ĉi, eĉ mi ne scias ĉu ŝi loĝas ie.

—Kiel? ekkriis la princo. La Feliĉo ne loĝas en la paradizo?

—Ne. Kiu vivadas tie ĉi senĉese estas tiu.

S. Petro estis duonferminta la pordon, kaj fingrmontris kvazaŭ homforman ombro, kiu estis pasanta kun mieno malbonhumora kaj melankolia.

—Ho! tiun mi bone konas; ĝi estas la enuo: Mi jam ĝin renkontis multfoje sur la tero. Preferinde, mil dolorojn dum jarcentoj senfinaj ol la eternan enuon.

Kaj sen pluj klarigoj rapidege malsupreniris, kvazaŭ fulmo, la vastan ŝtuparon, kiu finiĝas ĉe la vestiblo de l'infero.

Tiel diras Schopenhauer: en la universo nur ekzistas malfeliĉo kaj tedo: la homoj, doninte la unuan al la infero, rezervis por la ĉielo nur la tedon.



# PAĜO MALSERIOZA

## LA VILAĜANO KAJ LA RABISTO.

Tradukis W. A. Henry, *Prairie City, Oregon*

En unu nokto vilaĝano estas vekita el profunda dormo de la edzino frapanta lin per ŝia kubuto, kaj paroletanta mallaŭte:

“Petro, leviĝu. Mi ekaŭdis iun movantan ekstere ĉirkaŭ la domo. Mi jam aŭskultis dum la lastaj dekkvin minutoj, kaj mi opinias ke rabisto ja venis por rabi nin.”

“Vi tamen ne scias. Eble estus rabisto, kaj eble najbaro. Ni ne maltrankviligu nin ĝis ni sciigos kiu estas li.”

“Nun do li laboras ĉe la malantaŭa pordo.”

“Kaj se li daŭrigos sian laboron, li envenos; sed ĝis li estos interne, kial ektrami kaj ekskui?”

“Sed ĉu vi volas, ke li tranĉu al ni la gorgojn?” ekkriis la ekscitita edzino.

“Kompreneble ne; sed la fremdulo eble ne havas tranĉilon. Vi bone scias, ke persono ne devas alrapidigi konkludojn.”

“Vian monon, aŭ vian vivon!” ordonis tiam la rabisto, post kiam li eniris perforte tra la pordo.

“Ho ve, sed mi ne havas monon, kaj se vi mortigos min, vi gajnos nenion,” rediris la vilaĝano.

“Sed vi havas azenon en la ĉevalejo.”

“Jes, certe; sed tio forprenus la vivrimedojn, per kiuj mi prilaboras mian nutraĵon. Tamen se vi ankoraŭ insistas . . . .”

“Mi efektive insistas.”

“Ĉu nenio ŝanĝos vian celon?”

“Nenio.”

“Do prenu ĝin, sed alie bonvolu ŝpari al mi la malmulton, kion mi havas.”

“Petro, vi estas malkuraĝulo,” ekkriis la edzino tiam, kiam la rabisto jam foriris al la ĉevalejo por havigi la azenon.

“Prefere mi estas filozofo, kara edzino mia. Se mi estus saltinta el la lito por kapti la homon, li estus mortiginta min. Se mi ne estus kuraĝiginta lin, ke li prenu la azenon, li estus traserĉinta la kajuton por eltrovi nian riĉecon. Se li ne alirus la ĉevalejon, la azeno ne estus piedfrapinta lin kaj rompinta al li la kruron. Tio estas la bruego, kiun vi nun aŭdas, kaj mi nun eliros por alligi la rabiston per ŝnurego, kaj kredeble mi ricevos rekompencan.”

La praktika signifo el tiu ĉi historieto instruas nin, ke iafoje estas rimedoj por ne fari aferojn, kiuj ofte finiĝas pli bone.

## LA PRESKAŬ-DONEMECO DE LA ESTINTA SRO. KEJSE.

“Nu, Mikĉjo, Kejse estis lerta homo.”

“Jes, Kejse certege estis lerta homo.”

“Kaj li estis ĝojema homo.”

“Vi estas prava. Kejse estis ĝojema homo—la plej ĝojema homo kiun mi iam konis.”

“Kaj li estis donema homo.”

“Donema homo? Nu, mi ne scias tiom pri tio. Ĉu li iam aĉetis ion por vi?”

“Ne—sed preskaŭ Unufoje li eniris en drinkejon, kie mi estis kun aliuloj, kaj ekkriis “Nu, knaboj, kion ni estas havonta? Pluvon aŭ neĝon?”

—*Clinton B. Burgess.*

“Ĉu vi povas savi la vivon de mia edzo,” demandis virino de kuracisto, kiu ĵus ĉeestis ĉe la lito de malsanulo.

“Jes, sinjorino. Li vivos. Li nur bezonas ripozon, kaj mi proskribis por li dormigilon.”

“Bone, sinjoro kuracisto! Kiel ofte mi donos ĝin al li?”

“Oh! Ne donu ĝin al li! Englutu ĝin!”

## LAŬ HELEN MAR.

El *Pearson's Magazine* eltiris, adaptis kaj tradukis Clarence L. Dean, 24 Phoenix Lodge Mansions, London, W.

Helen Mar, konata amerika rakontistino, kiu jam de kelkaj jaroj havas grandan sukceson en Londono, kiel rakontistino de ŝercaj historietoj, verkis en la januara *Pearson's Monthly* artikolon pri siaj travivaĵoj, citante la jenajn kiel kelkajn el la plej sukceshavantaj de siaj rakontetoj:

\* \* \*

Sinjoro aĉetis aŭtomatan muzikilon kaj metis ĝin en sia banĉambro, ĉar, diris li, kiam mi banos, estos agrable ankaŭ aŭskulti bonan muzikon. Post kelkaj tagoj amiko demandis, ĉu la afero marŝas laŭ lia espero.

"Ne tute," respondis li, "ĉar la muzikilo ludas nur 'Gardu la reĝ' al ni,' mi devas ĉiam min starigi, dum mia ĉeesto en la banĉambro."

\* \* \*

Pastro, kiu kutime faris tre longajn predikojn, foje, jam parolinte preskaŭ unu horon, diris:

"Nun, unu momenton konsideru ni la profetojn. Estas la pligrandaj profetoj, kaj la malpligrandaj profetoj. Estas ankaŭ Jeremiaĥ. Nu, en kiu loko metos ni Jeremiaĥ?"

"Oh," diris voĉo en la malantaŭa parto de la preĝejo, "Jeremiaĥ havu mian lokon; mi iros hejmen."

\* \* \*

Juna kaj bela amerikanino, kies patro fabrikis botojn kaj ŝuojn, kaj tre grandmaniere anoncadis siajn fabrikaĵojn, alvenis al Londono kaj fianĉiĝis kun junulo de bona deveno. Sed lia familio rifuzis konsenti al la edzigo, se la patro ne forlasus sian entreprenon kaj ĉesigus siajn anoncojn.

La fraŭlino sendis submaran telegramon al la patro: "Edziĝo ne fariĝos se vi ne ĉesos vendi botojn kaj ŝuojn."

Per submara telegrafado respondis la patro: "Mi ne vendas sed vere fordonas ilin. Legu miajn anoncojn."

\* \* \*

Malgranda grupo da viroj, sidantaj en

klubejo, pridiskutis la virinojn. Nur unu el ili silentis. Petite ke li donu lian opinion, li diris tre malrapide: "Nu, ĝenerale parolante, mi konsideras virinon kiel—ĝenerale parolante."

\* \* \*

En societa kunveno oni ludis la jenan ludon: Ĉiuj invititaj estis petataj fari la eble plej malbonan vizaĝon, kaj tiu, kiu, laŭ la opinio de sinjoro deĵoranta kiel juĝisto, faris la plej malbelan vizaĝon, ricevos premion. Post ĉiuj ĉeestantoj kiel eble plej malbeligis sin, la juĝanto alproksimiĝis al unu el la sinjorinoj, kaj diris: "Sinjorino, mi kredas ke povas esti nenia dubo, ke estas vi, kiu rajte akiris la premion."

"Sed," respondis ŝi, "Mi ne partoprenis en la ludo."

## KELKAJ.

Senditaj de Claude Schaffner, Fort Dodge, Iowa.

Du irlandanoj, Patriko kaj Mikelo, sin trovis sur subeniranta ŝipo en la mezmaro. Patriko laŭte eksplodegis, kriante, "Ho ve, la ŝipo suben iras! ĉu vi ne komprenas, idiotulo?" Diris Mikelo, tamen, senzorge, "Nu, kial prizorgi pri tio, la ŝipo ne apartenas al ni!!!"

\* \* \*

Hebreo havis unufoje multe la saman sperton. Subite vekigante el peza dormado, li sciigis, ke la ŝipo baldaŭ subeniros. Vere laŭ sia nacieca naturo, kaj sin tute forgesinte, li supreniregis al la ferdeko, kriante, "Kiu donos al mi 2.50 spemilojn por mia poŝhorloĝo?"

\* \* \*

Du drinketuloj ĵus finigis sian semajan laboron ĉe la fervojo kaj sentis sin pretaj por peti siajn pagojn de la fervoja kompanio. Tamen, ili sciis, ke ili ne troviĝis en la plej bona kondiĉo, kaj, tial, timetis sin prezenti al la kasisto. Fine, la unua proponis al la alia, ke li promenu laŭ la relo, por sciigi, ĉu li povas rektlinie iradi. Tio fariĝis, kaj proksime al la fino de la provo la iranto demandis sian kunulon, "Kiel mi ĝin faras?" "Bonege!" estis la respondo, "sed kiu promenas kune kun vi?"

# STRICTLY CONFIDENTIAL

## WHY WE MENTION IT AGAIN.

When the forms of our November number are put on the press, they will represent a cost, all told, of about seven times that of the forms for a regular number. When they are "dead" they will be valueless junk—old metal which, six weeks from now, will have gone back to the melting pot. While they are alive, however, they can be made of great value to the Esperanto cause, by printing and circulating an immense quantity of that Barcelona Congress number.

We mention it again because when those forms are ordered off the press it will be with a sense of deep regret, a somewhat oppressive consciousness that we are, after all, only a very small affair in America. A good deal of planning, a good deal of sacrifice, and some hard and happy work will have gone into the making of those forms, and to feel that they must be taken off the press with less than 100,000 copies printed—less than *one* copy for every *one thousand* persons in North America—is to have a sadness.

But when we compare it with three years ago—well, some thirty mail-bags and a heavily loaded two-horse wagon compared with a little bundle under your arm doesn't seem so bad. The edition will in any event contain one hundred and twenty times as much paper as was required for our December, 1906, number.

Still, whatever cheering comparisons

may be conjured up, the fact remains that to throw away these forms with less than a hundred-thousand edition seems like a wanton waste of energy!

Twenty-two thousand newspaper and magazine editors, 85,000 clergymen, 23,000 school principals, 138,000 physicians, 10,000 college professors, 65,000 college students, 6,700 members of state legislatures—but why multiply numbers? All these and many more valuable addresses ought to receive copies of Barcelona Congress edition. We can't hope to cover such lists *this year*, but if *you* do what you can this year, *next year* there'll be many thousands more Esperantists to help sustain the financial burden of the propaganda.

Five cents a copy in bundles of five or more.

Here is a list of subscriptions not previously acknowledged:

Miss Emily M. Tobey, Milwaukee, Wis. . . . .	40
Wm. A. Martin, Cristobal, Canal Zone, Panama . . . . .	20
Joseph Ratliff, Lyons, Kansas . . . . .	20
Dr. W. S. Hamilton, Wheeling, West Va. . . . .	20
J. M. Clifford, Jr., Braddock, Pa. . . . .	20
Mrs. N. T. Pulsifer, New York City . . . . .	20
Frank P. Zent, Everett, Washington . . . . .	20
Virgil C. Dibble, Charleston, S. C. . . . .	50
W. H. Crowell, Washington, D. C. . . . .	30
Albert Leeds, Amelis, Ohio . . . . .	20
Mrs. Anna W. Jiran, Modesto, Cal. . . . .	20
E W. Alberty, Pittsburg, Kansas . . . . .	20
C. M. Wirick, Chicago . . . . .	20
Lois D. Beck, Manchester, N. H. . . . .	20
George B. Wrenn, Ashland, Ohio . . . . .	20
Hervey Gulick, Gatico, Chile (for Magazines and Newspapers) . . . . .	40

## NOT OUR STOPPING-POINT.

Some publishing firms are content with deserving appreciation, and are willing to take what comes their way. A bigger and (oh, modesty!) perhaps a better class take a gun and go hunting for business. We're not content for a minute to let the merits of this magazine and its relation to the success of the propaganda in America speak for themselves. We must keep continually reminding you of what we are doing and how much more we want to do and have to do and must do before we can consider our work a success. We can't stop and wait for you to discover our merits—that would be more ethical, more cultured, and more—nice; but it would be *less successful*.

Now we have before us the biggest task yet—the Sixth Congress. The function of this house is to advertise Esperanto. As soon as fixed charges are cared for, our receipts are turned into careful advertising. *Every time you get a new subscriber to this magazine you*

have made a prospective supporter for the Congress. Not only that, but you have given us the means of getting another subscriber, and so on. That is the thing which costs you no personal funds—to advise every new student to take the magazine; to have him subscribe if possible when he buys his text-book of the language. It's perfectly innocent, perfectly polite, to ask your Esperantist friends if they are on our list; and if they're not, it's *perfectly easy* for you to receive and forward their subscriptions.

Do you know that, with all our work for three years, there are at least fifteen thousand newspapers and periodicals whose editors have never received a line of printed matter from us—not a hint—not a postal card! We *must* reach these people this year. We can easily do it if half those who read this page will appoint themselves missionaries to extend our circulation among their acquaintances.

As to your own renewal—the date of expiration is printed on the wrapper with your name.

## Back From Barcelona

Our Arthur Baker, well known to most of you through the magazine, and to many of you personally, is coming back from France, Spain, England, Holland and the Barcelona Congress, where he has been with mouth agape, eyes awake and ears agog for incidents of interest with relation to Esperanto. Quite a lot has escaped him, no doubt, but you can be sure he will bring home experiences worth much more than anything he declares for customs. He will be in fine condition to give

### PROPAGANDA LECTURES

with live enthusiasm and the sort of finality which goes with the testimony of the uncontradicted eye-witness. You may think you need help to organize your local club. If you do, let us "send you a man" who has experimental knowledge of the matter from all sides. Mr. Baker's lectures will be available in Eastern States during November and the first two weeks in December; west of the Mississippi, January and February. Special illustrated newspaper copy, standard lyceum advertising paper, hall decorations and a fine exhibit of Esperantaĵoj, will be furnished. Write us for information as to expenses and dates.

**American Esperantist Company, Chicago**